

Dialoga instrutekniko, 2a-parto
Claude Gacond, 322-a radioprelego, 1969.12.10 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La 7-an de septembro ni gvidis en Solothurn seminarion pri la dialogoj en la esperanto-instruado.

A.- La pasintan semajnon ni donis kelkajn klarigojn pri la avantaĝoj kaj limoj de tiu instrutekniko, kaj ni legis al vi la kvar unuajn dialogojn.

Cl.- Hodiaŭ ni donos al vi kelkajn pliajn klarigojn kaj legos la unuajn dialogojn, kiuj ekformas teatraĵeton.

A.- Kiam uzi la dialogojn en la kurs-disvolviĝo ?

Cl.- La plej taŭga momento por la dialogado estas la komenco de la leciono.

A.- La dialogado favoras la kontaktojn inter la lernantoj, kio helpas al la daŭrigo de la leciono.

Cl.- Jen kiel devas disvolviĝi ĉiu dialogo.

A.- Unue : Disdono de la dialoga teksto.

Cl.- Due : Divido de la lernantoj en grupoj, kiuj respondas al la nombro de dialogantoj : du grupoj, tri grupoj, kaj tiel plu.

A.- Trie : Kolektiva korusa legado.

Cl.- Kvare : Lingvaj klarigoj laŭ la proponita programo, kiu sekvas ĉiun dialogon.

A.- Kvine : Samtempa ekzercado en grupetoj, kun la instigo forlasi la skribitan tekston. Tiu forlaso de la skribita teksto devigas la lernantojn al tuja parkerado de la dialogaj frazoj.

Cl.- Sese : Tasko : Por la venonta leciono, parkerigo de la dialogo.

A.- Per la deka dialogo komenciĝas teatraĵeto.

Cl.- Jen tiu deka dialogo :

Tom Bel :- *Ĉu vi parolas en esperanto ?*

A.- Julia Ĉagreno.- *Jes, mi komencas paroli en esperanto.*

Cl.- Tom Bel.- *Ho, vi estas komencantino. Kiu vi estas ?*

A.- *Mi estas Julia Ĉagreno. Kaj vi, kiu vi estas?*

Cl.- *Mi estas Tom Bel. Kie vi loĝas?*

A.- *Mi loĝas en Roma. Kaj vi, kie vi loĝas ?*

Cl.- *Mi loĝas en Ĝenevo kaj en Nov-Jorko.*

A.- *Ho, vi loĝas en du urboj. Kio estas via profesio ?*

Cl.- *Mi estas tradukisto ĉe UN. Kaj vi, kio vi estas ?*

A.- *Mi estas instruistino.*

Cl.- En ĉiu dialogo la novaj radikoj estas substrekitaj. Oni ilin retrovas en la lingvaj klarigoj. Jen la lingvaj klarigoj, kiuj akompanas tiun dekan dialogon :

A.- dek, deka, deko ;

Cl.- paroli, parole, parola ;

Dialoga instrutekniko, 2a-parto
Claude Gacond, 322-a radioprelego, 1969.12.10 & 13

A.- esperanto, esperanta ;

Cl.- komenci, komenco, komenca, ŝi komencas paroli ;

A.- i, dialogi, esti, vidi ;

Cl.- ha ;

A.- -ant, komencanto, komencantino, li estas parolanta ;

Cl.- kaj,

A.- urbo, urba,

Cl.- j.

A.- kio, kion, kio estas dialogo ? kion vi komencas ?

Cl.- profesio, profesia, profesii ;

A.- traduki, traduko ;

Cl.- -ist, tradukisto, tradukistino ;

A.- ĉe, mi loĝas ĉe mi ;

Cl.- UN ;

A.- instrui, instrua, instruo, instruisto ;

Cl.- Tiuj lingvaj klarigoj estas la rezulto de la gradigita enkonduko de novaj radikoj. En tiu deka dialogo estis enkondukitaj 17 novaj radikoj.

A.- Jen la dek unua dialogo. Ĝi estas la sekvo de la teatraĵeto ; parolas Julia Ĉagreno kun Irena Ĉapelo :

Cl.- Irena Ĉapelo.- *Ankaŭ mi estas instruistino. Kion vi instruas ?*

A.- Julia Ĉagreno.- *Ho, mi instruas al infanoj. Mi instruas ĉion. Kaj vi, kion vi instruas ?*

Cl.- *Mi instruas nur geografion kaj historion.*

A.- *Do, vi instruas al grandaj lernantoj, ĉu ne ?*

Cl.- *Jes, mi instruas ĉe gimnazio en Berlin.*

A.- *Ĉu en la orienta aŭ okcidenta parto de la urbo ?*

Cl.- *En la okcidenta parto. Kaj vi, en Roma, ĉu ne ?*

A.- *Jes, mia lernejo estas en Roma.*

Cl.- Tiu dek unua dialogo enkondukas 18 novajn radikojn.

A.- En la dek dua dialogo parolas Karlo Ĝentil kun Tom Bel.

Cl.- Karlo Ĝentil.- *El kiu lingvo vi tradukas ĉe UN ?*

A.- Tom Bel.- *Ho, mi tradukas el multaj lingvoj : el la franca, el la itala, el la hispana, el la germana, el la angla kaj el la rusa.*

Cl.- *Ho, vi parolas en multaj lingvoj !*

A.- *Mi parolas nur en tri lingvoj : en la franca, en la angla kaj en esperanto. En la aliaj lingvoj mi nur legas. Kaj vi, en kiuj lingvoj vi parolas kaj en kiuj lingvoj vi nur legas ?*

Dialoga instrutekniko, 2a-parto
Claude Gacond, 322-a radioprelego, 1969.12.10 & 13

Cl.- *Mi parolas en la germana kaj en la svis-germana.*

A.- *Kaj en esperanto.*

Cl.- *Ho jes, mi forgesas ĝin. Kaj mi nur legas en la franca kaj en la angla.*

A.- *Kio estas via profesio ?*

Cl.- *Mi estas fervojisto.*

A.- Tiu dekdua dialogo enkondukas 15 novajn radikojn.

Cl.- Jen por fini tiun prelegon la dek tria dialogo. Parolas Maria Papilio, Karlo Ĝentil kaj la aliaj.

A.- Maria Papilio.- *Jen gesinjoroj Pomfrit. Ili parolas kun fraŭlino Dolça.*

Cl. Karlo Ĝentil.- *El kie ili venas ?*

A.- *Mi ne scias. Mi nur scias, ke ili estas gefrancoj, sed ke ili ne loĝas en Francio. Ili portas du valizojn.*

Cl.- *Mi iras ilin helpi.*

A.- *Mi venas kun vi. Mi scias, ke kun ili venas japana esperantisto.*

Cl.- kaj A.- *Ĝis revido! Ni baldaŭ revenos.*

Cl.- La aliaj.- *Ĝis baldaŭ !*

A.- Tiu dek tria dialogo enkondukas 15 novajn radikojn.

Cl.- Kiel vi konstatis, tiu teatraĵeto, kiun oni povas ripeti komence aŭ fine de ĉiu leciono iĝas pli kaj pli longa lecionon post leciono. Ĝi metas la lernantojn en situaciojn, kiujn ili retrovos en la esperantista vivo.

A.- La venontan semajnon en tria kaj lasta prelego pri tiu temo ni donos kelkajn aliajn klarigojn pri la dialoga tekniko kaj legos parton de la sekvaj dialogoj. Tiel vi ekkomprenos, kio estas la dialoga tekniko en la esperanto-instruado.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-